

Sekso kaj Egaleco

Sendependa
bulteno

Informoj pri
virina agado

Numero 16

Januaro 1988

Novaj direktoj

Mallonge post la katastrofo de Ĉernobilo, la japanaj kunlaborantoj de *SKE* (Hukunaga Makiko kaj Yamakawa Setuko) proponis al mi, ke mi plivastigu la temaron de ĉi tiu revuo. Ili argumentis, ke la travivo de la planedo estas temo, kiu funde koncernas ĉiujn virinojn, kaj do devus esti traktata en feminisma eldonaĵo.

Tiutempe, mi ne konsentis kun ilia opinio, preferante limigi la enhavon de *SKE* al pure feminismaj temoj. Tamen, mi nun demandas min, ĉu mi pravis. Mi konstatas, ke la emo plilarĝigi sian interesosferon estas aktuala trajto de la virina movado. En la inismaj revuoj, kiujn mi konas, ofte troviĝas artikoloj pri la jenaj temoj: pacismo, la nuklea minaco, rasismo, malriĉeco, sano, samseksemeco, vivmedio, ktp. Ankaŭ se oni rigardas la proponatan programon de KVA pri seminario por virinoj (vidu p. 15), oni konstatas, ke multaj el la temoj ne estas feminismaj en la plej mallarĝa senco, kvankam certe ĉiuj estas temoj, kiuj nuntempe okupas la atenton de la internacia virina movado.

Mi rimarkas, ankaŭ, ke multaj el la antaŭaj kontribuintoj al *SKE* intertempe moviĝis al novaj interesoj, kiel cetere mi mem (kiel verŝajne jam tro klare evidentiĝis en la lastatempaj numeroj!)

Kiel klarigi tiun evoluon en la virina movado? Ĉu ĝi signifas, ke ĉiuj bataloj jam estas gajnitaj? Certe estas vere, ke la situacio de virinoj laŭ

Sekso kaj Egaleco

Sendependa bulteno. Aperas neregule.

Abono (4 numeroj):
16 ned. gld. aŭ 15 irk.

Respondkuponojn sendu rekte al Anna
Brennan, monpagojn al ŝia nederlanda
poŝtĉekkonto, n-ro 4412211.

Redaktoro
Anna Brennan
Colle Rasto
I-00039 Zagarolo
Italujo

Kunlaboris en ĉi tiu numero
Elisabetta Formaggio
Brian Holser
Dermod Quirke
Kompostis Dermod Quirke

PERANTOJ

INTERNACIA (prezo: 16 ned.gld.): Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe
Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Poŝtĉekkonto 378964 (UEA).
Banko: Mees & Hoop, Coolsingel 93, 3012 EA Rotterdam (konto 25.52.89.804).

BRAZILA: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 11-1105, 70084 Brasília (DF).

BRITA (prezo: £4,00): Dermod Quirke, 14 Glen View, Halifax, HX1 2YL.
Poŝtĉekkonto 12 463 0006.

FRANCA (prezo: FF45,00): Anne Elise Ambles, 11 rue de Ducs de Bar, 55000
Bar-Le-Duc. Poŝtĉekkonto 2 923 77 D, Nancy.

GERMANA (prezo: DM14,00): VEJGA, Töpferstraße 20, 4500 Osnabrück.

ITALA (prezo: Lit.9000): Anna Brennan, Colle Rasto, 00039 Zagarolo. (Nur por
italaj abonantoj; aliaj prefere pagu al ŝia nederlanda poŝtĉekkonto, aŭ al nacia
peranto).

JAPANA (prezo: ¥1500): Sei to Byodo Hakkokai, p/a Hukunaga Makiko,
Maginu 1833-2-308, Miyamae-ku, Kawasaki-si, 213. Poŝta ĝirokonto 0-99911,
Tōkyō.

KATALUNA (prezo: Pt.975): Josep Serrano, Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat
482, 43080 Tarragona.

NEDERLANDA (prezo: f16,00): Anna Brennan. Poŝtĉekkonto 4412211.

NORVEGA (prezo: Kr.40,00): Margrete Landmark, Torødveien 109, 3135 Torød.
Poŝtĉekkonto 5 73 61 29.

SVEDA (prezo: Kr.40,00): Märtha Andréasson, Lilla Tolsered pl. 2265, 425 90
Hisingskärra. Poŝtĉekkonto 27 01 05-4880.

USONA (prezo: \$8,00): Charles Power, 12122 K Little Patuxent Parkway,
Columbia, MD 21044.

Respondeca eldonanto (verantwoordelijke uitgever): Anne Tilmont, Nationalestraat 108, 2000 Antwerpen

difinitaj vidpunktoj pliboniĝis en la lastaj 20 jaroj. La proporcio de virinoj en la profesioj, ekzemple, malrapide altiĝas, pli da virinoj troviĝas en la parlamentoj, eĉ virinaj ĉefministroj plioftiĝas, kvankam ankoraŭ ne oftas. Almenaŭ en kelkaj landoj, virinoj eklaboras en metioj kaj profesioj, kiuj antaŭe ne estis malfermitaj al ili: kiel plumbistoj, ĉarpentistoj, pilotoj, fajrobrigadistoj, eĉ kiel astronautoj.

Oni nuntempe normale atendas, ke virino laboru ekster la hejmo; eĉ - kiel mi mem spertas - tiuj, kiuj restas hejme, sentas sin sub premo kaj devas pravigi sian decidon. Tio kunportas ankaŭ la malan flankon: viroj estas devigataj, kvankam ne ĉiam volonte, doni pli da tempo al okupoj, kiuj antaŭe estis konsiderataj la sfero nur de virinoj.

Tiuj pozitivaj evoluoj tamen ne signifas, ke la laboro de la virina movado finiĝis. Estas vere, ke estas pli da virinoj en la profesioj. Tamen, la plejmulto el ni verŝajne surpriziĝus, aŭ almenaŭ trovus tion komentinda, se irante diskuti nian konton kun la nova bankodirektoro, ni malkovrus, ke tiu estas virino. Estas pli da virinoj en la parlamentoj - sed jen kelkaj ciferoj: en la itala parlamento virinoj nun tenas proksimume 10% el la lokoj (kompare kun antaŭaj 7%); en la irlanda ili tenas 8,4%; en la germana Bundestag ili tenas 15,4% (kompare kun antaŭaj 9,8%). Ja temas pri gajnoj, sed ĉu pri egaleco?

Dum virinoj tenas nur frakcion de la regantaj postenoj, ne estas grandaj esperoj, ke la kondiĉoj por virinoj en la hejmo kaj la laborejo grandtrajte pliboniĝos. La apartaj bezonoj de virinoj ne estas bone prizorgataj de viraj leĝdonantoj kaj laborestroj, nek de tiuj malmultaj virinoj, kiuj ja sukcesis atingi la pinton en sia profesio, sed nur post feroĉa konkurso, kiu devigis ilin subpremi en si ĉiujn kvalitojn de simpatio kaj helpemo al aliaj.

Konsiderante ĉi tiujn faktorojn, do, oni konkludas, ke efektive restas sufiĉe da fareda laboro por la virina movado. Sed en tiu kazo, kial feministoj nuntempe emas okupiĝi pri aliaj problemoj? Por respondi tiun demandon, ni rigardu mallonge al la lastatempa historio de la feminisma movado.

(Aŭ, pli precize, de la okcidenta feminisma movado. Mi konscias, ke miaj komentoj ne estas universale aplikeblaj kaj ne prezentos rekoneblan bildon al ĉiuj legantoj de *SkE*. Tamen, verki universalan historion estas ekster mia kompetento, do mi limigos min al la situacio, kiun mi persone konas, kaj lasos al miaj ne-okcidentaj legantoj la taskon kompletigi ĉi tiun resumon, eventuale per artikolo en *SkE*).

La okcidenta virina movado ekestis en la fino de la sesdekaj jaroj, kaj atingis sian plenan impeton dum la sepdekaj. En tiu periodo, multaj virinoj la unuan fojon ekrigardis sin mem, sian konscion, siajn personajn rilatojn kaj la ĉirkaŭan mondon, kaj malkovris novan filozofion. La teorioj de feminismo estis ellaborataj, kaj aperis grupoj, revuoj, eldonejoj k.s. por diskuti ilin.

La Esperanto-movado spegulis tiujn evoluojn - tial montrante cetere, ke ĝi ja estas ligita kun aktualaj okazaĵoj en la "normala" mondo (kvankam ĉiam, bedaŭrinde, kun malfruo de tri-kvar jaroj!) - per la starigo de la Komisiono pri Virina Agado en 1975. La ekapero de *Sekso kaj Egaleco* en 1979 (denove kun plurjara malfruo rilate al al la cetera mondo!) certe estis signo de la sama tendenco.

La sepdekaj jaroj estis ekscita periodo por pensemaj virinoj, kiuj faris multajn profundajn malkovrojn pri si mem kaj pri la socia situacio de virinoj. Sed evidente, novaj ideoj ne povas resti eterne novaj; post iom da tempo, ili perdas sian freŝecon kaj iĝas banalaj faktoj, jam bone konataj al ĉiuj. Tio estas necesa kaj dezirinda paŝo por ĉiu nova teorio, kaj montras, ke ĝi atingis sian celon de ĝenerala akcepto en la socio - kvankam sendube en iom diluita formo. (Kompreneble, ĉiam restas tiuj, kiuj mortos nekonvinkite; ĉio nova bezonas pli ol unu generacion por plene enradikiĝi.)

Kiam movado atingas tiun punkton, ĝi perdas multajn el siaj antaŭaj aktivuloj. Ili ludis sian rolon en la ellaborado de nova teorio kaj dum la agado multe riĉiĝis en sia persona evoluo. Nun, tamen, ili antaŭeniras al aliaj kampoj. Plej ofte, ĉar la pli aktivaj membroj de sociaj movadoj kutime estas junaj, tio simple signifas, ke ili geedziĝas, ekhavas familion, kaj do havas malpli da tempo kaj energio por dediĉi al eksteraj interesoj. Ili ne nepre forgesas sian antaŭan idealon, sed ĝi fariĝas fono al la vivo anstataŭ centro.

Por tiuj, kiuj deziras pluaktivi, finiĝis la entuziasmiga fazo de nova malkovro. La amasoj lasas la amasmovadon, kaj restas malgranda kerno da seriozaj laborantoj. Ili havas la taskon ellabori la fajnajn detalojn de la teorio kaj apliki ĝin al praktikaj problemoj.

(Flanka noto: Kvankam la supraj komentoj rilatis ĉefe al la virina movado, ili estas aplikeblaj ankaŭ al la Esperanta. Nia movado, bedaŭrinde, neniam atingis la lastan fazon, en kiu ĝiaj teorioj fariĝus parto de la ĝenerala pensomaniero: la utopia "fina venko". Tial niaj membroj pasigas sian tutan vivon eterne kaptitaj en la unua aŭ "entuziasma" fazo.)

Nun kiam la virina movado maturiĝis, estas evidente, ke la grupoj kaj revuoj starigitaj por diskuti novan filozofion, perdis sian originan celon. Ĝenerale, ili adaptiĝas per aplikado de feminismaj principoj al iu formo de praktika agado. Tial okazas la ekflorado de novaj agadkampoj.

Kio do povas esti la estonta rolo de revuo, kia *SkE*? Mi (kun la kutima kelkjara malfruo) antaŭvidas du eblecojn. Unu estas, ke ĝi lasu la teoriantan kampon por dediĉi pli da spaco al raportoj pri la aktualaj kondiĉoj de virinoj kaj pri agadoj por plibonigi tiujn kondiĉojn. La alia estas, ke ĝi kuraĝe elpaŝu ekster sian ĝisnunan mallarĝan temaron por okupiĝi pri pli vastaj demandoj - ĉiam laŭ feminisma vidpunkto, kompreneble.

Skribinte ĉi tion, tamen, mi ne povas rezisti rideton. Estas facile verki belajn deklarojn pri "novaj redaktolinioj". Kiel ĉiuj Esperantaj revuoj, *SkE* ne disponas pri profesiaj ĵurnalistoj, kaj praktike akceptas tion, kion ĝi ricevas. Do, por plenumi la supran proponon necesas la kunlaboro de vi, la legantoj kaj kontribuantoj. Mi atendas viajn reagojn al ĉi tiu artikolo kaj ankaŭ la kontribuadojn, per kiuj eblus realigi ĝian enhavon.

Anna Brennan

R
e
a
g
o
j.



Mi legis kun intereso la numeron 15 de *SkE* kaj venis al mia menso du pripensoj, kiujn mi decidis surpaperigi por vi. Laŭ la subskriboj la kunlaborintoj estis plejparte malinoj, kaj tio invitis min al medito, ĉu tio estas hazardo aŭ ĉu efektive vi ricevas pli da kontribuoj far tiuj. En tiu lasta kazo, kion tio signifas? Ĉu inter via legantaro procente plias viroj? aŭ ĉu inoj emas legi kaj ne skribi, do, ankoraŭfoje pasivi kaj ne aktivi?

Krom tiu ĝenerala konsidero, mi emas nun esprimi mian admiron kaj gratulon pro la kuraĝo de Dermot Quirke tiom senkaŝe kaj simple paroli

pri siaj problemoj por alfronti ĉiutagaĵojn, kiuj povas ŝajni al supra rigardo banalaj, sed sur kiuj mi, ekzemple, neniam haltigis mian atenton. Kaj tiu artikolo iasence devigis min interesigi pri la temo, alfronti kaj konsciiĝi pri la ekzisto de problemoj kaj ... envii tiun paron. Ja, efektive envii ilin, kiuj konstruis sian propran vivon, ne influite de la "normo" de la socio, kiel okazas al la "normaluloj", kaj kio foje, mi eĉ kuragis diri ofte, efektive influas la duopan rilaton en negativa senco.

Dankon, do, al Dermod, kiu tiom simple kaj senĝene helpis al la legantoj kompreni parton de nia socio, iliajn problemojn kaj ties solvojn.

Mi esperas pli ofte legi tiom interesajn artikolojn almenaŭ en la sendependaj informiloj kiel *Sekso kaj Egaleco*.

Michela [mikela] Lipari, Italujo

Mi bonorde ricevas vian tre interesan revuon *Sekso kaj Egaleco*. Ĉiufoje, kiam mi ricevas ĝin, mi tuj tralegas la tutan materialon kaj mi trovas interesajn opiniojn kaj klarigojn.

En la lasta, la 15a numero, mi legis kun granda atento vian artikolon "La dormanta princino". Mi multfoje legis la menciitajn fabelojn, sed mi neniam analizis ilin, tial via opinio nun tute alie prezentas al mi ilin.

Interesaj estas ankaŭ la artikoloj "Virinoj en la ĉeĥa historio" de Marie Bartovská, "Virinoj en la itala kamparo" de Renato Corsetti kaj aliaj. Sed la artikolon de Dermod Quirke mi tra legis kun iom malagrabla sento, kiu estas ne normala. Sed la recepton pri "Mikspota rizajo" mi provos kuiri dum la sekvontaj tagoj.

Saulcerite Neilande, Latvujo

... La gazeto tre plaĉas al mi. Ĝi estas varia kaj bone redaktita. Dum la legado oni preskaŭ ne povas ĉesi por paŭzo. Ankaŭ la aspekto tre plaĉas al mi ...

Veronikin' Somero, GDR

Dankon pro sendado de via interesa revuo. Lastan numeron mi tute legis. Mi laŭdas eĉ la artikolon "Vira feministo". Oni devas aŭskulti ĉiujn.

Teresa Jankowska, Polujo

De frua aspiro ĝis nuna nadiro

Bernard Golden, Hungarujo

La unuaj numeroj de *SkE*, aperintaj en 1979 kaj 1980, donis antaŭtempan esperon, ke tiu novaĵletero, envicigante inter la periodaĵoj de Esperantujo, trarompos novan vojon. La elano de la komenca periodo estis promesplena, se juĝi pri kelkaj pensinstigaj artikoloj el la plumoj de esperantistoj bone konataj en la movado, kiuj esprimis originalajn vidpunktojn en la kadro de la feminismo.

Sed en postaj numeroj estis rimarkebla malfavora ŝanĝigo. En mia letero sendita al la redaktorino en aŭgusto, 1985, mi skribis jene pri n-roj 11 kaj 12: "Traleginte ilin, mi iom seniluziigis, ĉar mi ricevis la impreson, ke mi jam legis similaĵojn antaŭe. En la legaĵoj mankas novaj vidpunktoj kaj interesvekaj ideoj. Ŝajnas, ke dum la longa paŭzo, *SkE* perdis la vervon, kiu karakterizis la pli fruajn numerojn, kaj nun la revueto estas survoje al sablonigo. ... Miaopinie estas eble plialtigi la kvaliton de la enhavo de *SkE*, se la redakcio akceptas por publikigo pli varian materialon, tuŝantan pli vastan temaron. Tiel oni ne legos *nur* pri sekso kaj egaleco en unu numero kaj pri egaleco kaj sekso en la sekva."

Pli kaj pli da pecoj en *SkE* havas nur efemeran, anekdotan karakteron, kaj oni vane serĉas seriozajn, detale dokumentitajn artikolojn kaj raportojn. La enhavo de n-ro 15 ja atingis la nadiron. En la sekvaj sekcioj mi kritikos specifajn erojn en tiu numero.

Recepto por nekuireblajo

Tute senutila estis la artikoleto "Feminisma recepto". Ekster Japanio, kie estas eble akiri la ingrediencojn por kuiri la mikspotan rizaĵon: lapo, konjakuo, tohuo, sakeo, ginko, amorfofalo? Nek "konjakuo" nek

Noto de la redaktoro: La supra artikolo, kiu estis multe tro longa, estas draste mallongigita. Ĉar ĝi ankaŭ enhavis multajn insultojn kaj ofendajn esprimojn kontraŭ kontribuintoj de SkE, la koncernaj sekcioj estas forigitaj.

“amorfofalo” estas registrita en *Plena ilustrita vortaro*, kaj por informiĝi pri tohuo en *Enciklopedieto japana*, estas necese serĉi la artikolon sub “toŭfuo”! En bonaj kuirlibroj estas kutimo proponi anstataŭaĵojn por maloftaj ingrediencoj en ekzotaj receptoj, sed Sibayama eĉ tion ne faris, do ŝia recepto estas same manĝebla kiel la papero, sur kiu ĝi estas presita. Jen ekzemplo de malŝparo de spaco en *SkE*.

Forgesita trajto de la itala kamparanino - ŝia virgeco

R. Corsetti surpaperigis siajn memorojn pri la tradicia statuso de virinoj en la itala kamparo. Ĉar la priskribo baziĝas sur liaj propraj travivaĵoj, sentebla manko en la asertoj kaj klarigoj estas la subteno de objektivaj sociologiaj donitaĵoj. Unu el la temoj traktita en fakverkoj pri sociaj kutimoj en Italio, estas la troiga emfazo pri la valoro de virgulino kiel edzino. Estas neeble prezenti racian bazon de la postulo pri virgeco ĉe virinoj (sed ne ĉe viroj!), ĉar tiu fizika propreco havas neniun funkcia valoron rilate la ekonomian produktivecon de estonta edzino. Tamen, estas sciate, ke en la tradicia itala socio, virino, kiu ne estis virgulino, ne havis ŝancon edziniĝi, krom se eksterordinaraj faktoroj intervenis.

Corsetti reliefigas la tragedion de sterileco ĉe virino (kaj ankaŭ viro) kaj klarigas, ke “oni akceptis la fakton kiel malbonŝancaĵon, eble kiel dian punon”. Laŭ absoluta skalo de valoroj, tiu situacio estas multe pli malavantaĝa por la bonfarto de la familio ol la stato de nevirgeco de la edziniĝonto. Verdire, ĉe virgulino estas risk-faktoro, ĉar povas esti, ke tiu virino, kiel edzino, montriĝos sterila. “Aliflanke de landlimoj, diferencaj la kutimoj.” En pluraj kulturoj de Afriko, oni rigardas la aferon alimaniere. Virino, kiu havas ekstergeedzegan infanon jam pruvis, ke ŝi estas fekunda, do ŝia valoro kiel edzino kaj patrino estas memevidenta.

For la manojn de la tradicia infanliteraturo!

En sia artikolo “La dormanta princino”, Anna Brennan malaprobas la bildon pri virinoj spegulitan en la tradicia infanliteraturo de Eŭropo. Ŝi pravas pri sia kritiko kadre de la nuntempaj konceptoj de feminismo, sed ŝi faras unu paŝon plu kaj modifas la enhavon de tiu kultura heredaĵo, por ke ĝi konformiĝu al ŝiaj antaŭjuĝoj. Tio ja estas netolerenda aroganteco. La verkoj, kiuj estas menciitaj en la artikolo, estis la *komuna propraĵo* de pluraj gentoj dum multaj jarcentoj, do ili estas netuŝeblaj! Imagu, kio okazos, se Brennan daŭrigos sian tekst-reviziadon. Hodiaŭ temas pri infanfabeloj, morgaŭ ŝi rakontos novajn versiojn de la klasika mitologio, post morgaŭ venos la vico de la teatraĵoj de Shakespeare, kaj neeviteble


estos reverkita la Sankta Biblio laŭ la “brenanisma” herezo. Oni komprenu unu fojon por ĉiam, ke neniu rajtas tuŝi-fuŝi literaturajn heredaĵojn. Se ne plaĉas al feministoj la malnovaj rakontoj, ili lasu ilin sur la breto kaj verku tute novajn fabelojn kun libera esprimado de feminismaj vidpunktoj.

RESPONDO DE LA REDAKTORO:

Mi respondos nur al tiuj komentoj, kiuj rilatas al *SkE* generale kaj al mia propra artikolo. Sendube, la aliaj verkintoj menciitaj en la supra artikolo kapablas mem defendi sin en posta numero, kaj mi invitas ilin tion fari.

La dua alineo de la artikolo esprimas dubon, kiun mi mem pli detale traktas aliloke en ĉi tiu numero. Golden proponas, ke ni aperigu “pli varian materialon, tuŝantan pli vastan temaron”. Ŝajnas, do, ke almenaŭ unu leganto efektive sentas la neceson malfermi *SkE* al pli generalaj demandoj.

Li poste komentas, ke tro da pecoj en *SkE* “havas nur efemeran, anekdotan karakteron, kaj oni vane serĉas seriozajn, detale dokumentitajn artikolojn kaj raportojn”. Laŭ mia opinio, Golden preteratentas la



distingon inter scienca studo kaj ĵurnalisma artikolo. Ambaŭ specoj de verko estas utilaj kaj havas sian apartan funkcion, sed ne havas senceon kritiki unu, ĉar ĝi ne estas la alia. Kompreneble, en faka periodaĵo necesas klarigi ĉiujn detalojn, aldoni piednotojn, bibliografion ktp. *SkE* tamen ne celas esti tia eldonaĵo. Ideale, ni deziras aperigi artikolojn kiuj estas pensovekaj sed samtempe koncizaj kaj plaĉe legeblaj.

La fadeno, kiu kunligas la komentojn de Golden, estas lia profunda respekto al la aŭtoritato. Li kritikis la mankon de "objektivaj sociologiaj donitaĵoj" en la artikolo de Corsetti pri italaj kamparaninoj. Por li la "objektivaj" komentoj de sociologo valoras pli ol la personaj spertoj de homo, kiu efektive vivis en tiu socio. Certe estas vere, ke eksterulo foje povas taksi situacion pli klare ol tiuj, kiuj mem travivas ĝin. Sed sciencisto povas doni nur parton de la bildo. Ciferoj kaj piednotoj ne povas redoni la homajn sentojn.

Lia respekto al la aŭtoritato montriĝas ankaŭ en lia aserto, ke oni ne rajtas modifi la enhavon de infanaj fabeloj. Legante lian proteston, oni ricevas mensan bildon pri gepatro, kiu sidas apud la lito de sia infano zorge kontrolante siajn vortojn laŭ peza volumo de la fratoj Grimm. Sed male, gepatroj kutime rakontas laŭmemore, kaj certe ĉiuj aldonas aŭ ŝanĝetas difinitajn detalojn. Sendube, tiuj nekonsciaj ŝanĝetoj iom post iom spegulas la malrapide ŝanĝiĝantajn sociajn valorojn.

Golden diras, ke tiuj fabeloj estas komuna propraĵo de pluraj gentoj, sed certe ĉiu kulturo rerakontas ilin laŭ siaj propraj kondiĉoj. En Britujo, ekzemple, la tri ursoj manĝas avenkaĉon, sed en Italujo, kie tiu manĝaĵo estas nekonata, ili manĝas buljonon. La tria el la tri porkidoj konstruas

SED URSOJ
NE ĜATAS
BULJONON!



sian domon el brikoj laŭ la angla versio; laŭ la itala, li konstruas ĝin el ŝtonoj. Mi intence mencias nur transkulturajn variaĵojn, sed inter anglalingvaj presitaj tekstoj troviĝas eĉ pli grandaj diferencoj. Kompare kun tiuj, la ŝanĝoj, kiujn mi proponis, estas nekonciderindaj.

Rilate al klasikaj mitoj, Shakespeare ktp, Golden tuŝas interesan demandon. Tamen ĝi estas ekster la temo de mia artikolo, kiu okupiĝis nur pri fabeloj.

Nadiro: (fig.) la plej malalta punkto.

HELPU! MI ESTAS KAPTITA EN GLUPOTO!

En antaŭa numero mi agnoskis la fakton, ke *SkE* nun fariĝis malregula, kaj petis vin, la legantojn, esti paciencaj, se ĝi ne plu sukcesas resti ĉe sia antaŭa tri-monata ritmo.

Tamen, mi suspektas, ke estas ĝuste tiu malreguleco, pli ol ia manko en ĝia enhavo, kiu kaŭzas malrapidan falon en la nombro da abonantoj.

Bedaŭrinde, estas tute ekster mia kapablo aperigi ĝin pli ofte. Mi foje havas la senton, ke mi baraktas en glupoto, kiam ekzemple la tekstoj bezonas nur lastan reviziadon antaŭ ol mi sendos ilin al Dermot Quirke por kompostado, sed mi dum tagoj ne povas okupigi pri ili pro unu aŭ alia okazaĵo.

Aldone al ĉio estas la malrapideco de la poŝto. Mesaĝisto sur ĉevalo - aŭ eble kun bovoĉaro - certe sukcesus alvenigi mian pergamenon pli rapide al la velŝipo, kiu portus ĝin al Britujo en nur du semajnoj, anstataŭ la ses nun bezonataj de la aerpoŝta servo.

Do mi povas nur repeti vin esti indulgaj pro la neevitebla malreguleco de ĉi tiu revuo. Samtempe mi volas inviti vin al pli aktiva kunlaborado. Vi rimarkos, ke multaj el la artikoloj en ĉi tiu numero estas verkitaj de la sama persono (kio certe ludas rolon en ĝia malofteco, ĉar verki artikolojn postulas multe pli da tempo ol redakti ilin!) Do skribu al *SkE*. Ne necesas verki plenan artikolon: respondu al tio, kion vi legis ĉi tie, komentu, reagu... Pluraj eroj en ĉi tiu numero efektive postulas tion. Sed krome, anoncu ĝin en via Esperanto-grupo, al viaj lernantoj, en via nacia Esperanto-revuo. Mi volonte sendos senpagajn provexemplerojn.

ab




Antaŭen kaj...

VIRINOJ EN GDR


Ĉirkaŭ 90% de ĉiuj laborkapablaj junulinoj kaj virinoj en GDR utiligas sian juran rajton je laboro, kaj do aŭ profesie laboras aŭ prepariĝas per profesia trejnado.

Pli ol 80% de ĉiuj virinoj akiris profesionan diplomon. Triono de la gvidaj funkcioj en la ekonomio estas okupataj de virinoj.

38,4% de la elektitaj popolaj deputitoj, 52,1% de la juĝistoj kaj 29,3% de la urbestroj en GDR estas virinoj.



Virinoj en la popola parlamento (Popola Kamro)



Virinoj kiel urbestroj

Sed ankoraŭ la kondiĉoj, sub kiuj virinoj plenumas la profesionan kaj la

dommastruman laborojn, ne estas samaj kiel ĉe viroj.

ALPISAS LI KONTRAŬ LA MUR'

Se vi konas la feminisman Esperanto-kasedon *Per nia nura vol'*, vi rekonos la supran verson el la kanto "La viroj". Kaj kiam temas pri pisado, ni virinoj devas agnoski, ke viroj ja havas avantaĝon, precipe kiam ni devas uzi malpuran publikan necesejon.

Usona entreprenistino, Lore Harp, nun decidis forigi tiun lastan diferencon per la invento de papera funelo, kiu ebligas al virinoj pisi starante. La interna tavolo de la funelo estas farita el akvoimuna papero, kaj la ekstera ebligas, ke ĝi tuj solviĝos kiam oni forĵetos ĝin en la necesejon. La funelo havas laŭmode francan nomon: Le Funelle.

Merkataj esploroj, faritaj de Harp mem kaj ankaŭ de ekstera firmao, montras, ke virinoj efektive volonte aĉetus ĝin. Ĝi utilas ne nur en publikaj necesejoj sed ankaŭ por inaj tendumantoj, skianto, maristoj ktp. La celo estas, ke ĝi estu vendata per maŝinoj en publikaj necesejoj, kaj ankaŭ en supervendejoj, apotekoj kaj vendejoj de ekipaĵoj por vojaĝado.


ZAMBIO DEVAS ATENTI SIAJN VIRINOJN

Pro siaj grandaj rezervoj de kupro, Zambio estis sufiĉe riĉa por importi siajn mangajojn ĝis 1982, kiam subite okazis drasta falo en la prezo de kupro. Nun la rapide kreskanta loĝantaro devas

lerni kiel mem produkti siajn manĝaĵojn.

Kiam okazis la krizo, preskaŭ ĉiuj restantaj terkultivistoj en Zambio estis virinoj. Ili ankoraŭ uzis tradiciajn metodojn kaj semis plantojn, kiuj estas bone adaptiĝintaj al la lokaj kondiĉoj.

La viroj plejparte laboras en la kuprominejoj kaj en la urboj. Tiuj viroj, kiuj ankoraŭ okupiĝas pri agrikulturo, kutime kreskigas vendeblajn rikoltojn, el kiuj la plej populara estas maizo. Eksterlandaj konsilantoj kuraĝigas ĝian kultivadon kaj ignoras la virinajn kultivistojn, kiuj ne produktas rikoltojn por vendado. Tial la agrikulturaj konsilantoj sendataj de la registaro ne vizitas virinajn kultivistojn kaj ne povas doni utilajn konsilojn, ĉar ilia trejnado preteratentis la tradiciajn kultivaĵojn. Ili ne konsideras, ke la virinoj estas "veraj" kultivistoj.



La speco de maizo (S52), kiu lastatempe estis enkondukita en Zambion, estas malpli rezistema ol la tradicia variaĵo. La tradicia agrikulturo de la virinoj, aliflanke, pli bone adaptiĝas al diversaj veteroj kaj kondiĉoj. Ĉar ili semas plurajn malsamajn kultivaĵojn, anstataŭ koncentriĝi je nur unu speco, ili certigas, ke almenaŭ kelkaj travivos, se la kondiĉoj estos malbonaj.

Nun kiam Zambio ne plu povas dependi de siaj rezervoj de kupro, ĝi ne plu devas malspari la sciojn de siaj kultivistinoj. Iliaj teknikoj de kultivado povus esti la sola maniero laŭ kiu la tero povos produkti sufiĉe por subteni siajn kultivistojn.

OVOBLANKOJ HELPAS NEFEKUNDAJN PAROJN

Por paroj, kiuj malfacile sukcesas koncipi, povus esti tre simpla solvo: ovoblanĉoj.

Usona ginekologo, d-ro Andrew [andru] Toledo, kiu specialiĝas pri la problemo de nefekundeco, raportas, ke pluraj paroj sukcesis koncipi, post kiam ili anstataŭigis sian kutiman vaginan lubrikaĵon per ovoblanĉoj.

Kontraste al aliaj lubrikaĵoj, ovoblanĉoj neniel malhelpas la agadon de la spermoj. Male, ĉar ili estas faritaj el pura proteino, kiel la spermoj mem, ili eĉ helpas ilin "naĝi" al la celo.

La uzo de ovoblanĉoj portas evidentajn avantaĝojn: ili ne kaŭzas negativajn flankefikojn, ili estas naturaj, malmultekostaj, kaj facile haveblaj kaj enmeteblaj.

Informojn provizis: Veronikin' Somero, GDR; *Ms.*, dec. 86; *Development Forum*, sep. 87.

...malantaŭen

La unua interlingvisto estis virino

Kiam oni eklernas Esperanton, oni kutime samtempe ekscias pri pli fruaj provoj krei internacian lingvon. Oni aŭdas, ekzemple, pri la filozofo Leibniz [*lajbnic*] kaj la edukisto Comenius [*komenjus*], kiuj en la 17a jarcento interesiĝis pri skemoj krei "universalan lingvon".

Kutime oni ne aŭdas, tamen, ke unu el la plej fruaj provoj krei artefaritan lingvon estis farita de virino, kvin cent jarojn antaŭe. En la 12a jarcento, Hildegard el Bingen, abatino de la monahinejo de Rupertsberg, verkis lingvon kun la nomo Ignota Lingua.

Hildegard naskiĝis en 1098 en la nuna Bavarujo, de nobela familio. Kiam ŝi estis ok-jara, ŝi eniris la monahinejon de Sankta Disibodenberg. Tie ŝi ricevis bonan edukon de la abatino, kiu mem estis rimarkinda virino, Jutta el Sponheim [*ŝponhajm*]. Necesas aldoni, ke grava funkcio de la monahinejoj en tiu tempo estis eduki la filinojn de nobelaj familioj. Hildegard studis ankaŭ muzikon, kaj, cetere, ŝi poste mem komponis verkojn, el kiuj kelkaj ankoraŭ travivas.

Kiam Jutta mortis, en 1136, Hildegard mem fariĝis abatino. Ŝi ne pasigis sian tutan tempon en la monahinejo, sed ankaŭ vojaĝis en la regiono de la nuna Germanujo. Ŝi akiris sciojn ne nur pri religiaj temoj, sed ankaŭ pri politikaj kaj civilaj aferoj. Pri tiuj demandoj ŝi korespondis kun papoj kaj gereĝoj. Ili respektplene aŭskultis ŝiajn opiniojn, kiujn, laŭ ŝi, ŝi akiris en vizioj.

Kiam ŝi decidis fondi la monahinejon de Rupertsberg, apud Bingen, ŝi diris, ke la preciza loko estis indikita al ŝi de la Virgulino kaj la anĝeloj per vizio. En tiu situacio, la papo kaj la imperiestro malfacile estus povintaj nei al ŝi la necesajn apogon kaj financon helpon.

Rilate al ŝiaj vizioj, necesas aldoni, ke mistikismo estis respektata religia filozofio en la mezepoko. Hildegard estis nur unu el serio da estimindaj inaj viziistoj, el kiuj la plej fama estis Jeanne [*jan*] el Arc [*ark*]. Kompreneble, en tiu epoko, neniu estus aŭskultinta la opinion de nura

SEMINARIO POR VIRINOJ

La Komisiono pri Virina Agado de UEA, gvidata de Elsbeth Bormann, planas seminarion por virinoj en Kalmar en suda Svedujo. La detaloj kiuj aperas malsupre (inkluzive de la dato) estas provizoraj, sed definitivaj informoj estas haveblaj de Elsbeth Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80, FR Germanujo.

NI HOMOJ SURVOJE AL UNUECA MONDO

Aprilo 1988

La programo konsistas el:

Diskuttrondoj

1. Kiel landoj kunfandiĝas al unueco.
2. Lingvoj: plureco kaj unueco.
3. Naturprotektado: la granda unueca tasko.
4. Ĉu seksa egaleco premisas unuecan homon?

Kursoj

1. Rapida kurso de la Internacia Lingvo.
2. La arto paroli antaŭ publiko.
3. Desegni kaj teksti kiel la vikingoj.

virino, precipe pri intelektaj aŭ politikaj aferoj. Eble tiuj virinoj subkonscie konstatis, ke iliaj ideoj estos pli atentataj, se ili prezentigos en la formo de sanktaj vizioj.

La monahinejo iĝis grava centro de la spirita kaj intelekta vivo. La monahinoj okupiĝis pri kopiado kaj ilustrado de manuskriptoj, pri fizikaj kaj artaj laboroj, kiel ekzemple brodado de vestoj por uzo en religiaj ceremonioj. Bedaŭrinde, la plej granda parto de iliaj produktaĵoj intertempe perdiĝis.

Hildegard verkis pri vasta gamo de temoj: pri naturaj sciencoj, medicino, farmakologio, lingvistiko kaj teologio. Ŝiaj verkoj estis legataj dum du jarcentoj, precipe trivoluma verko pri ŝiaj vizioj, kiun ŝi produktis inter 1141 kaj 1173.



Kelkaj el ŝiaj ideoj pri medicino kaj natura scienco estis tre originalaj por la epoko. Interalie, ŝi opiniis, ke la tero turniĝas ĉirkaŭ la mondo, ke la "fiksitaj" steloj moviĝas, kaj ke la sango cirkulas en la organismo.

El ŝia vasta verkaro, tiu kiu interesas esperantistojn estas ŝia skemo pri Ignota Lingua. Tio praktike konsistis el listo de 900 vortoj pri la homa vivo kaj la naturo, kun la signifo aldonita en la germana aŭ la latina. Jen kelkaj ekzemploj: *Aigouz* = "Dio", *diveliz* = "diablo", *iminois* = "homo", *isparriz* = "spirito", *vaniz* = "virino", *luzeica* = "lumo", *crizia* = "preĝejo", *grusimbuz* = "ĉerizo", *muzimibuz* = "nukso", *gimeldia* = "pinarbo", *wagiziaz* = "saliko", *graxia* = "violo".

Oni rimarkas, ke la vortoj generale baziĝas sur la germana aŭ la latina. Aliaj ekzemploj uzas ankaŭ hebreajn aŭ helenajn radikojn, dum aliaj estas simple inventitaj. La singularo plejparte finiĝas per -z. Cetere, apud la vortlisto troviĝis ankaŭ propono pri alfabeto "ignoto".

Kial Hildegard verkis ĉi tiun skemon? Pluraj komentistoj proponis diversajn klarigojn, sed generale ŝajnas, ke multaj homoj kun intereso pri lingvoj iam en ŝia vivo mem faras la provon inventi. La lingvo neniam estis praktike uzata, krom la fakto, ke kelkaj frazoj aperas en himnoj kiel rita frazo por esprimi ideojn.

Hildegard mortis en la jaro 1178, je la aĝo de 81 jaroj, kio estis tre konsiderinda en tiu tempo. Pro ŝia originaleco, ŝia klereco, ŝia politika influo kaj ŝia grava kontribuo al la scienco de ŝia epoko, ŝia nomo certe devus esti konata al ĉiuj feministoj.

ab

MILITA MEMORO

Lorena Armaroli, Italujo

Petite kontribui al *Ske* artikolon pri siaj spertoj en okupaciata Italujo dum la jaroj de la Dua Mondmilito, Lorena Armaroli priskribas la jenan veran epizodon. Sian kontribuojon afable tradukis Michela Lipari. Pro spacaj kialoj, la artikolo estas iom mallongigita.

Somero, 1944. La sirenoj ŝiras la aeron kaj kaŝas la obtuzan sonon de la bombaviadiloj, kiuj jam superflugas la urbon en kompaktaj formacioj. Iom poste aŭdiĝas la unuaj muĝoj; la bomboj plenumas sian detruan taskon sur pontoj, stratoj kaj domoj.

Estas preferinde ne cedi al la tento ŝirmi sin en rifuĝo-kelo en la urbo. Saltinte sur la biciklon, mi direktiĝas al la ĉirkaŭurbo. Mi atingas la kamparon kaj dum iom da tempo sentas min trankvila, for de la danĝero. Mi pedalas pli malrapide kaj fine havas la tempon por gratuli min ĉar mi saviĝis el tiu infero.

Abrupte per malalta flugo, preskaŭ tuŝante la poplajn foliojn, aperas du malgrandaj aviadiloj: la famaj "Pippo" kiuj igis danĝeraj eĉ la kamparajn vojetojn dum la lastaj du jaroj de la milito. Mitralfadoj inundas la vojon kaj trafas ne nur militveturilojn de la okupaciata armeo, sed ankaŭ la civilulojn kiuj serĉas rifuĝon ekster la loĝkvartaloj. Instinkte mi ĵetas min en fosaĵon kaj klopodas malproksimiĝi de la vojo. La pafado daŭras nur kelkajn sekundojn, sed postlasas mortintojn, vunditojn kaj korŝirajn kriojn.

Kun aliaj travivintoj mi helpas porti la vunditojn al proksima kampara domo, kie la virinoj strebas prizorgi ilin. Maljunulo, trempita de sango, ĝemas pene. Dum mi klopodas lin levi per la ŝultroj, Don Callisto, la tiea paroĥestro, kiu estas ĉiam aktiva dum tiuj malfacilaj jaroj, diras al mi, ke mi lasu la viron; por li nenio plu fareblas. Lia kruro estas fortranĉita de la korpo kaj ne estas ebleco pri taŭga kuracado. Don Callisto restos kun li dum mi hastas aliloken.

Fine la sireno anoncas la alarmofinon. Mi direktiĝas al la vojo, por rekapti

mian biciklon. Ĝia bela kolora reto, kiu protektas la jupon de la radiojde la rado, interplektiĝis kun la pedalo de alia biciklo. Estas sufiĉe malfacile liberigi ĝin sen difekti ion, kaj mi akceptas volonte la helpon proponatan de juna viro kiu staras apude. Li ŝajnas tre koncernata de la problemo. Diable, li portas grizan kompleton kaj ne havas uniformon: junulo en civilaj vestoj, rara produkto, pro la tempoj!

La interparolado komenciĝas kaj pludaŭras flue: ĝi malproksimiĝas de la nuna okazaĵo por atingi pli gajajn temojn. Lia interesiĝo pri mi iom surprizas min. Mi sentas min nepreta, mi ne scias kiel reagi al amindumado de pli aĝa junulo. Mia sperto limiĝas al okulumadoj kaj biletejoj de lernejoj kamaradoj kaj, ĉiukaze, de samaĝuloj.

Kia honto! mia robo estas preskaŭ ĉifono; miaj ŝuoj, eĉ, konsistas el strioj de ŝnuroj por pakado, plektitaj kaj noditaj ĉe la maleoloj, kaj najlitaj al lignaj kojnoj. Tamen la biciklo estas bela! Ĝuste la antaŭan tagon mi pacience briligis la radiojn, la radcirklojn kaj la tenilojn. La malbonkvalita millitempa materialo postulas multe da zorgoj por bele aspekti, sed mi scias kiel atingi brilan rezulton, tamen je kostoj de la ungoj, kiuj, je la fino, aspektas malgaje nigriĝintaj. Kaj tiu detalo denove ĝenas min, kiam ni alvenas al oficiala sinprezento: "Giovanni" [ĝovanni], "Lorena", "Mi ĝojas renkonti vin".

Li petas rendevuon. Momenton mi pripensas. Se mi akceptos tuj, li povus opinii, ke mi estas junulino, ni diru, iom malserioza. Kaj malakcepti? Sed ĉu eblas forĵeti tian okazon? Mi decidus, ke dek tagoj sufiĉos, kaj ni aranĝas renkontiĝi post precize dek tagoj, en la sama loko kie ni disiĝas.

Mi rapidas hejmen; mi estas ekscitita; li estas plenkreska, temas pri serioza afero: li havas preskaŭ kvin jarojn pli ol mi! Mia amikino estas pli aĝa kaj povas doni al mi konsilojn.

Antaŭ ĉio necesas pensi pri vesto. Ni ekzamenas la malmultajn eblecojn kaj altiras nian atenton la kurtenoj de la dormoĉambro, kie ni kune loĝas dum tiuj malfacilaj jaroj. Kudristino en la proksima urbeto certigas nin pri ilia transformiĝo en veston. La malnovaj eluzitaj ĉemizoj de mia patro utilos kiel subjupo, la brodaĵoj de la kusenujoj de mia avino donos iom da eleganteco al la orlo. Denove la ĉefa problemo estas la ŝuoj. Ne aĉeteblas tiel multekosta varo kaj la Naturo donacis al mi kiel piedojn du grandaĵojn: 41 laŭmezure. Fine ni solvas la problemon per lignaj kojnoj kaj malnova felta ĉapelo de mia patro, por roli kiel la supra parto. La rezulto estas sufiĉe kontentiga.

Intertempe laŭ sugesto de mia amikino, mi klopodas zorgi pri mia korpo. Mi estas atenta ne malpurigi la ungojn, ĉiutage brosdas la abundajn harojn, kiuj atingas miajn ŝultrojn.

Kaj jen la deka tago! Mi banas min per akvo varmigita de suno, frotas min per sapo intencita por lavaĵoj, kaj surmetas la "novan" veston. La bildo kiun resendas al mi la spegulo estas, kiel tute, agrabla: la robo estas mirige freŝa kaj malpeza, la ŝuoj iom pezaj kaj malhelaj, sed ne necesas mencii la troan varmon ĉe la piedoj.

Mi foriras feliĉa. Ni ambaŭ estas tre akurataj. Mi proponas senhezite mian manon por saluti lin. Li devos rimarki ke miaj ungoj estas zorgitaj. Ni direktiĝas al la monteto. Ni ne povas multe interparoli, ĉar ne eblas bicikli flankoĉeflanke. La vojo estas aĉa kaj necesas lasi spacon por la armeaj veturiloj. Mi ne kapablas decidiĝi akcepti la inviton de Giovanni halti, do ni pedalas ankoraŭ plurajn kilometrojn, ĝis interrompo de la strato devigas min halti.

Ni eniras trinkejon por eviti la sunon. Oni proponas al ni du botelojn da akvumita vino, kiu anstataŭas la trinkaĵojn, en tiu epoko ne haveblajn. Ni ĝuas ilian malvarmecon kaj priparolas diversajn temojn. La gastejstro partoprenas la babiladon kaj ĉio antaŭeniras bone. Giovanni, tamen, gajnante centimetron post centimetro, glitas sur la benko kaj alproksimiĝas ĉiam pli. Li profitas de la momentoj kiam la gastejstro interesiĝas pri aliaj gastoj por lanĉi siajn rigardojn, kiujn mi ŝajnigas ne rimarki. Klopodante teni la distancon, ankaŭ mi glitas dekstren, ĝis mi atingas la benkofinon kaj devas halti. Mi opinias, ke estas tempo proponi, ke ni reiru hejmen, kiam Giovanni aŭdace kisas min laŭte survange. Tio estas tro!

Mi leviĝas kaj foriras decidmiene sen atendi eĉ momenton, biciklante rapide al la urbo. Kontrolbarilo devigas min halti. Ankaŭ Giovanni estas en la grupo de la haltigitaj. Ni estas dividitaj en du grupojn por la kontrolado: la inoj unuflanke, la viroj aliflanke. Kiam ni estas liberigitaj, en malsamaj momentoj, ni ne plu havas la eblecon revidi nin.

La tagoj pasas sed estas eĉ ne spuro de Giovanni. Fine ankaŭ la memoro pri li forviŝiĝas.

Venas la monatoj tuj post la fino de la milito. Komenciĝas granda agado pro la referendumo per kiu la itala popolo decidos, ĉu ĝi deziras respublikon aŭ monarĥion. Placo Maggiore [maĝore] estas la centro kie la du partioj okazigas publikajn kunvenojn; nenombreblaj homamasoj

kolektigas en tiu loko de dialektikaj debatoj. Ĉeestas multaj gejunuloj, kiuj subtenas ambaŭ vidpunktojn.

Subite estas krio: "Lorena!" Apude estas Giovanni. Ni ĝojas pro la renkonto. Ni ambaŭ sukcesis travivi la militon. Estas haosa interjeto de demandoj kaj respondoj. Ĉiu volas pleniĝi la unujaran vakuon. Giovanni aludas al kaptiteco, sekve de tiu kontrolhaltigo.

De la balkono de la ĉefa konstruaĵo en la placo, la parolanto krias: "For la reĝan familion!" La plej granda parto de la ĉeestantoj aplaŭdas kaj mi kun ili. Giovanni silentas. Li denove estas studento pri juro, kaj kiel lia tuta familio, li inklinas al la monarĥio.

Ni troviĝas ĉe kontraŭaj flankoj kaj ne sufiĉas la paliginta memoro de unu somera tago por ke ni rerenkontiĝu.

VIRINOJ EN SCIENCO


Virinaj sciencistoj produktas malpli da eldonitaj artikoloj ol siaj viraj kolegoj, sed edzineco kaj familiaj devoj ne povas klarigi la diferencon. Edziniĝintaj virinoj kun infanoj eldonas same multe kiel siaj fraŭlinaj kolegoj.

Studoj montras, ke virinaj sciencistoj eldonas malpli da artikoloj ol viroj en la samaj kampoj. Unu ofta klarigo estas, ke virinoj donas malpli da tempo al siaj esploroj pro familiaj devoj. Kvankam ĝi ne estas pruvita, tiu opinio en multaj kazoj influas la karieron de sciencistinoj.

En la februara numero de la revuo *Scientific American* ("Scienca usonano") aperis esploro pri tiu demando kun la titolo "Marriage, Motherhood and Research Performance in Science" (Edzineco, patrineco kaj sukceso en scienca esplorado) de Jonathan R. Cole kaj Harriet Zuckerman. La artikolo estis sendita al *SkE* de Judith Junger.

La verkintoj decidis detale esplori la efikon sur virinaj sciencistoj de iliaj familiaj respondecoj. Ili intervjuis 120 sciencistojn, el kiuj 73 estis virinoj kaj 47 estis viroj. Ili zorge dividis la studatojn laŭ sekso, nombro da jaroj en sia profesio, kampo, kaj grado de eminenteco. (Evidente la lasta detalo estas malfacile mezurebla, sed ili konsideris, ekzemple, ĉu la studato estas

GRAFIKAJO 1.



Ĉi tiu grafikaĵo montras la historion de eminenta sciencistino (naskiĝjaro: 1930), edziniĝinta, kun kvar infanoj. Oni vidas, ke edzineco kaj naskoj ne havis longdaŭran negativan efikon sur ŝia produktado. La zigzaga nigra linio montras, kiom da eldonitaj artikoloj ŝi verkis en ĉiu jaro; la pli pala linio montras la ĝeneralan tendencon.

membro de la plej rekonataj sciencaj akademioj, ĉu ŝi/li estas profesoro en unu el la plej alte taksataj fakoj en ŝia kampo, ĉu ŝi/li ricevis subtenon de difinitaj fondaĵoj ktp.) (1973)

Precipe la pli aĝaj sciencistoj ofte renkontis la opinion, ke edzino kaj patrino ne povas esti samtempe sukcesa sciencisto. Eĉ ili mem kredis tion. 70-jara biologino memoris, ke la estrino de ŝia laboratorio estis ŝokita, kiam ŝi edziniĝis, kaj malpermesis al ŝi plulabori en la laboratorio. Laŭ la estrino, ŝi perdis virinojn.

Kvankam sociaj sintenoj ŝanĝiĝis, eĉ nun junaj sciencistinoj ankoraŭ ofte renkontas la opinion, ke graveda virino ne povas esti serioza sciencisto. Kiam la homoj en estraj pozicioj agas laŭ tiu supozo, ili serioze limigas la eblecojn je promociado de edziniĝintaj virinoj.

Grafikaĵo 2 montras, ke la plejmulto da sciencistoj eldonas malpli da artikoloj en la fruaj jaroj de sia kariero. La supra grafikaĵo montras la eldonritmon de eminenta biologistino (naskiĝjaro: 1921), kiu neniam edzinigis. La ĝenerala tendenco estas simila al tiu de virinoj, kiuj edzinigas kaj naskas. La malsupra grafikaĵo montras la eldonritmon de eminenta vira hemiisto (naskiĝjaro: 1930). Ankaŭ li eldonis malpli kiam liaj infanoj estis junaj, kvankam li havis malmultajn hejmajn respondecojn.

Sed ĉu edzinigintaj sciencistinoj efektive laboras malpli efike ol fraŭlinoj? Ĉu tiuj kun infanoj produktas malpli da sciencaj studoj ol tiuj sen infanoj? Ĉu la nombro de infanoj influas la esplorkarieron de la patrino?

La detala esploro priskribita en *Scientific American* montras, ke tiuj faktoroj tute ne influas la efikecon de sciencistino. Tiu konkludo surprizas, sed samtempe subtenas la rezultojn de pli fruaj studoj. (La verkintoj mezuris efikecon per la nombro da eldonitaj sciencaj artikoloj, kiujn la studatoj produktis. Evidente, tio estas nur unu el la eblaj kriterioj, sed estas proksima rilato inter ĝi kaj, ekzemple, la maniero laŭ kiu tiu homo estas taksata de aliaj sciencistoj.)

10/24



En la grupo de "eminentaj" sciencistinoj, edzinigintoj eĉ produktis mezume iom pli da eldonitaj artikoloj ĉiujare kompare kun siaj fraŭlinaj kolegoj: 3,0 kompare kun 2,2. Inter la edzinoj, tiuj kun infanoj produktis mezume 2,9 artikolojn jare, dum tiuj sen infanoj produktis 3,3. Dum la du tri-jaraj periodoj antaŭ kaj post la nasko de la unua infano, la produktokvanto ne falis, kiel oni eble supozus, sed altigis de 1,5 al 2,7. La nombro de infanoj tute ne influis la eldonritmon. La grafikaĵo 1 montras la tipan eldonritmon de edziniginta sciencistino kun infanoj.

Tio ne signifas, ke sciencistinoj ne donas tempon al siaj familioj. Ili agnoskas, ke infanoj postulas multe da tempo. Tio, kio malaperas, estas aliaj interesoj: legado, vizitoj al kinejo, rilatoj kun geamikoj ktp. Krome, ili multe okupiĝas, almenaŭ mense, pri sia esplorkariero dum ili estas hejme; fakte, multaj el ili raportis, ke ili pli facile povas forgesi pri siaj infanoj dum ili laboras, ol forgesi pri siaj studoj dum ili estas hejme.

Grava faktoro por multaj sciencistinoj estas la fakto, ke ankaŭ la edzo estas sciencisto. Do ili ofte diskutas sian laboron hejme, kaj krome la edzo komprenas kaj akceptas ilian dediĉon al siaj esploroj. Sciencistinoj kun sciencista edzo produktas mezume 40% pli da artikoloj ol tiuj, kies edzo havas alian profesion.

3/5

GRAFKAJO 2.



Fakte, preskaŭ ĉiuj sciencistoj, ĉu viraj, ĉu inaj, ĉu geedziĝintaj, gepatriĝintaj aŭ ne, produktas relative malmulte da sciencaj artikoloj en la komenco de sia kariero, sed la kvanto kreskas laŭ aĝo. Tiu periodo de relative malalta produktado hazarde koincidas kun la periodo kiam la plejmulto ankaŭ geedziĝas kaj havas infanojn, kaj do oni kompreneble emas supozi ke la du faktoj estas ligitaj. Sed male, ĉe needziniĝintaj virinoj kaj viroj, kies edzinoj liberigis ilin de la hejma ŝarĝo, same eldonas malpli en la komenco de sia kariero. (Vidu la grafikajon 2.) Do ne estas rilato inter la hejma situacio kaj la profesia produktado.

Kial sciencistoj eldonas malpli da artikoloj en la komenco de sia kariero? Unu kialo estas, ke en la komenca fazo de esplorprojekto, la tempo estas dediĉata al la pli praktikaj aspektoj de la tasko; la verkado venas poste. Krome, junaj sciencistoj ĝenerale faras la tutan praktikan parton mem. Poste en sia kariero, ili ofte akceptas administrajn postenojn kaj superrigardas la laboron de tuta laboratorio. Do ili ludas rolon en pluraj projektoj samtempe kaj ilia nomo aperas sur pli granda nombro da eldonajtoj.

Kvankam la plejmulto de la sciencistinoj mem opiniis, ke ilia patrineco tute ne influis ilian laboron (tiel subtenante la rezultojn de la studo), tri el la 37 virinoj kun infanoj raportis, ke ĝi ja provizore malhelpis ilin. Unu biologistino diris, "... mi ne konstatis, ke oni povas esti tiom perturbata de siaj hormonoj ... mi trovis, ke dum tuta jaro mia menso ne funkciis."

3/5

Edziniĝintaj sciencistinoj kun infanoj, do, povas resti aktivaj - sed ne senkoste. Ili devas forigi preskaŭ ĉiun intereson krom la laboro kaj la familio, precipe kiam iliaj infanoj estas malgrandaj. Kelkaj sciencistinoj konstatas, ke ili ne plu povas libere resti malfrue en la laboratorio; ili sentas sin "ekster la klubo" pro manko de tempo por neformalaj diskutoj kun kolegoj.

La artikolo do montras, ke edzineco kaj infanoj ne havas negativan influon sur la produktiveco de sciencistino, kvankam ili ja povas kaŭzi aliajn problemojn. Restas tamen unu demando. Mi citas la lastan alineon de la artikolo: "Kiel do oni povas klarigi la persistan malsamecon de eldonofteco inter viraj kaj inaj sciencistoj? Kial viroj produktas rimarkinde pli da eldonitaj artikoloj dum sia kariero ol virinoj el komparebla fono? Edzineco kaj patrineco evidente ne klarigas la aferon. Ĝi restas enigmo, kiu postulas pli da kompara studado pri la esplorkarieroj de viraj kaj inaj sciencistoj."

ab